

Deklaro al Japana Esperanto-Instituto

La Firmao Gutenberg Orchestra Co.,Ltd. (=GO) publikigas ke, rilate al la gazeto redaktita de GO nomata “Esperanto Culture Magazine” (=ECM), GO kaj Japana Esperanto-Instituto (=JEI) atingis jenan interkonsenton.

1. GO akceptis la peton de JEI je la 21a de januaro kaj konsentis ŝanĝi la nomon de ECM. La nova nomo estas tia, kian GO nove proponis al JEI je la 3a de februaro 2021. Tiu formala nomo estos publikigita post la oficiala varmarko-petado fare de GO.

2. GO ankaŭ ŝanĝos la nomon de la retejo por ECM nomata “esperantoculture.com”.

3. GO ĉesos malfermi retan salonon nomatan “Esperanto Culture Community”.

4. Rilate la registropetadon de la varmarko de ECM, al la deklaro de JEI je la 27a de decembro 2020, GO respondis jene: Ni petis registron de varmarko “Esperanto Culture Magazine” nur en la kampo de eldonaĵoj ene de Japanio. Ni deklaras, ke per tio ni havas nenian intencon limigi eldonagadon de ajna eldonaĵo kun skribo de Esperanto. Ni volas, ke neniuj en Japanio eldonu samnomajn eldonaĵojn. Ni nur sekvis la kutimon registri varmarkon por glate irigi komercon, kaj tiu registrado rilatas nur enlande.

Ni denove respondas, ke la supre notitaj principoj validas ankaŭ post la nomoŝanĝo de ECM. JEI akceptis tiun denovan respondon.

5. GO deklaras, ke ĝi kunhavas grandan idealon pri la progresigo de internacia komunikado kaj kultura interŝanĝo kun JEI, kaj vartos amikan kaj kunlaboreman rilaton kun JEI.

Prezidanto de Gutenberg Orchestra Co.,Ltd.

Sugatsuke Masanobu

la 8an de februaro, 2021